

Annette von Droste-Hülshoff,

## Lastaj vortoj

*tradukita de Joseph Ferdinand Berger*

Amatoj, kiam min forlasis  
spirit', ne ploru do pro mi!  
Por paca ekzistad' min kaŝis  
en brila tag' la bona Di'.

Ne estas plu ĉagreno tera.  
Eternas via bild' ĉe mi.  
Mi petos pri balzamo vera  
por vundoj kaj dolor' de vi.

Se svingas Pac' en nokta ombro  
Seraffugilojn super Ter',  
ne pensu plu pri mia tombo!  
Salutas mi el stela sfer'.

...

Annette von Droste-Hülshoff,

## Lastaj vortoj (2)

*tradukita de Manfred Retzlaff*

*2a versio*

Karuloj, kiam pasis mia  
Spirit', pri mi ne ploru vi;  
Ĉar lumas jen en paco Dia  
Eterna tago ja al mi.

En tiu senaflikta foro  
Memoru daŭre mi pri vi,  
Por viaj vundoj kaj doloro  
Mildigon volas peti mi.

Se venas kun flugilo sia  
La nokta paco al la Ter',  
Ne pensu plu pri tombo mia,  
Salutas mi el stela sfer'.

...

*Traduko de la Germana poemo "Letzte Worte" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (\*1797-01-10 – †1848-05-24) en Esperanton de JOSEPH FERDINAND BERGER (\*1894-10-07 – †1976-03-28) en 1958.*

*Arg-160-467 (2009-11-22 09:37:58)*

*Tiu ĉi traduko de la poemo estas unue publikigita en 1958, ĝi aperis en la Esperanto-revuo "Norda Prismo", n-ro 58/2, sur paĝo 74. Vidu ankaŭ la ttt-ejon "http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Revuoj/np/np5802/lastaj.html" de s-ro Donald Harlow el Pinole CA-94564, Kalifornio. Malgraŭ la supra indiko la poemo ne estas verkita de la poetino mem, sed - laŭ pli nova scienca ekkono - de ŝia nevino Elisabeth, post la morto de Annette von Droste-Hülshoff. Oni ĝis nun nur atribuis la poemon al Annette von Droste-Hülshoff.*

*Pri Joseph Ferdinand Berger rigardu ankaŭ la retejon [http://wapedia.mobi/eo/Joseph\\_Ferdinand\\_Berger#2](http://wapedia.mobi/eo/Joseph_Ferdinand_Berger#2).*

*Traduko de la Germana poemo "Letzte Worte" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (\*1797-01-10 – †1848-05-24) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2004-05-16.*

*MR-311-5 / Arg-160-474 (2004-05-16 13:52:23)*

*La trian strofon mi, Manfred Retzlaff, ŝanĝis iom laŭ la modelo de la traduko de Josph Ferdinand Berger, uzante ankaŭ la rimvortparon "Ter' - sfer". En mia unua traduko-provo de l' 26.08.1997 resp. de l' 15.05.2004 mi iom tro ofte uzis la rimvortojn "mi, vi, ĉi". Tio certe ne estas tre bona solvo kaj efikas iom ĝena.*